

la naska fasko

Numero ses
2009-07-06
lundo

La ĉiutaga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

Kio okazos hodiaŭ?

- ★ **3:00 ptm:** Grant parolos pri Volapuko
Kie: AP&M 4301 (se vi volas, ke oni gvidu vin, rendezuu kun Hoss antaŭ la loĝejoj je 2:45).
- ★ **7:30 ptm:** PIV-ludo kun Niko
Kie: komuna salono en Cuzco



Pri PIV-ludo

de Niko KALIVODA

En PIV-ludo teamoj interbatalas per difinoj de strangaj vortoj el la Plena Ilustrita Vortaro. La ludestro donas al ĉiu teamo kelkajn nekonatajn vortojn kun la ĝustaj difinoj. Poste la teamoj apartiĝas por ke ili ne povu aŭdi unu la alian.

Ĉiu teamo komune kreas tri falsajn sed verŝajnajn difinojn por la PIV-aj vortoj, kaj gardas ilin sekretaj. La falsaj difinoj estu tre PIV-ecaj, por bone trompi la aliteamanojn. Verkinte la falsajn difinojn, la teamoj rekuŝiĝas.

Dum la ludo, unu teamo laŭtleĝas vorton kaj kvar difinojn: tri falsajn kaj unu veran. La alia teamo devas diveni, kiu difino estas la vera. Oni gajnas poentojn por ĝustaj divenoj. Je la fino, la teamo kun plej multaj poentoj gajnas.

Bonvolu alporti skribilon kaj paperon—sed memoru: vi ne rajtas alporti vortaron!

Pri Volapuko

“ Danke al fervojo, vaporŝipo, telegrafo kaj telefono, la mondo fariĝas malpli vasta en tempo kaj spaco. La landoj de la mondo efektive pliproksimiĝas. Tial la epoko de mallarĝmensa kaj timema ŝovinismo estas finita por ĉiam... Rilate al ankaŭ ... lingvo, la homaro devus unuiĝi.

— Johann Martin SCHLEYER
Unua gramatiko de Volapük (1880)

Volapük estas internacia lingvo kreita en Germanujo antaŭ la ekapero de Esperanto. Nur kelkaj homoj parolas ĝin nun, sed siatempe ĝi estis relative populara, kaj eĉ en Usono estis kursoj kaj lernolibroj pri la lingvo. En sia prelego, Grant esploras iomete la strukturon de Volapük kaj oni lernos havi simplan konversacion en ĝi.

Ĝustatempe por nia hodiaŭa temo de Volapuko, Neal kontribuis sian tradukon de la *Volapükahüm*, la himno de Volapuko (kiu estas por Volapuko kiel *La Espero* estas por Esperanto). Neal klarigis, ke “kvankam mi tradukis ĝin preskaŭ laŭvorte, mi preskaŭ ne povis NE plibonigi ĝin, ĉar ĝi estas sufiĉe aĉa poemo.” La himno estis redaktita kvardek jaroj post sia apero, sed la jena estas la unua, malnovstila teksto.

Volapükahüm

de Franz ZORELL

Sumolsöd stäni blodäla!
Dikodi valik hetobs.
Tönöls jüli baladäla,
Volapüke kosyubobs.
Vokobsöz ko datuval:
“Menade bal, püki bal!”

Kis also kanos koblodön
Lölika vola menis?
Kis also kanos menodön,
Äs pük bal, omsa stadiš?
Klu tonodosöz in val:
“Menade bal, püki bal!”

Datuvel püka lifomöd!
Lifomsöd pakets ota!
Volapük aiflolomöd,
E välapüked oma:
“Oibinomöd su tal
Menade bal pük bal!”

Himno de Volapuko

tradukis Neal WILEY

Ni prenu la flagon de frateco!
Tiranismon ni ĉiuj malamas.
Tenantaj la signojn de unueco,
Volapukon ni kunguas.
Ni voku kun granda aŭtoro:
“Por unu homaro, unu lingvo!”

Kio tiel povus enfratigi
la popolojn de l’ tuta mondo?
Kio tiel povus plibonigi
iliajn statojn kiel unu lingvo?
Do sonu ili en konsento:
“Por unu homaro, unu lingvo!”

Vivu la granda aŭtoro de la lingvo!
Disvastigado de la sama, vivu!
Volapuko ĉiam fluru,
kaj ĝia lingva elekto:
“Ĉiam estu sur la tero:
por unu homaro, unu lingvo!”

Atentu pri la rajoj...

de Tor KINLOK

Ĉiam dum la jaro estas rajoj en la maro, eĉ ĝisgenue. Rajoj ne atakas homojn, sed se oni surtrentas ilin, ili forte reagas per venenaj pikiloj. La pikoj estas doloregaj, sed ofte ne vere vundas. Oni devus varmigi pikitan membron, ekzemple per ensabligo, kaj post kelkaj horoj la doloro forpasos. Tre malofte oni bezonas helpon de kuracisto por rajopiko.

Wikipedia

Ekscii nescii

de Reni PORTER

Plejparte mi parolas Esperanton kun lokaj klubanoj en Halifakso. Bedaurinde, ĉiuj havas anglan kiel sian unuan lingvon. Do kiam ili uzas anglismon, mi komprenas; kaj kiam mi uzas anglismon, ili komprenas. Post jaroj de tio, ni parolas lokan formon de Esperanto. Kiam mi venas al NASK, la personoj, kiuj parolas puran Esperanton ne komprenas min. Aŭ eĉ plej plaĉe—ili korektas min. Tio estas gajno ĉe NASK por mi—ekscii, kion mi vere ne scias.

En mia loka grupo neniu (inkluzive de mi) parolas senhalte Esperanton. Ni ofte stumblas, sed finfine komunikiĝas. La ritmo de nia babilado estas kiel krucvortnigma ludo, ne natura konversacio. Ĉe NASK la instruistoj kaj kelkaj aliaj parolas ritme, flue (en la muziko de nia lingvo)—kun la nuancoj de tono kaj koloro kiu donas sentojn al ideoj kaj belecon al imagoj. Ege plaĉas al mi, nur sidi kaj aŭskulti—banita en la sonoj—la klareco.

Limeriko de falsaj amikoj numero 2

de anonimulo

La geja debitoro
de la oro-debito
Kun malgajeco rezignis
pri aĉeto de la plato kaj konekstiĝis
Kun alia en adulto.

Poemo de Ŝajo

Kie estas la land', la mia, la nia? ie.

Ĉu en ĉiel' aŭ sur ter'?

Alvoku min kaj en korbat', je okulfrap',
mi kuros al mia hejm', al mia sennacia
gent'.

Bonvenu, bv. sidiĝi, komfortiĝi, etendiĝi,
ĉirkaŭspekti, flari, gustumi, ne ĝenas eĉ
leki la fingrojn.

Vi estas prizorgataj per ideantoj
—eĉ plibone malsamaj ol samaj, ĉiamaj
kontraŭuloj.

Tiuj kiuj stimulas, streĉas, strebigas la
serĉantojn.

Do klaĉu, fajfu, oni ne bezonas flustri.

Karaj geZamen', mojosaj geesperantistoj,
Altigu la voĉojn, parolu pli sentime!
nun vi estas ĉe vi.

Konvinkaj esperantistoj

de Vido GILLET

De tempo al tempo mi rimarkas, ke kiam iu demandas al dek esperantistoj kiel diri ion—kaj se ne jam ekzistas vorto oficiala—kutime ok respondas same. Tamen foje la naŭa povas konvinki la aliajn, ke ŝia respondo pli bele taŭgas.



“Meztero”. Ĉu hobitoj loĝas ĉe *International House*? (Foto danke al Tor KINLOK.)

La zoologia ĝardeno de Sandiego

de Eduard KUSTERS

Montri bestojn en zoologiaj ĝardenoj, certe nuntempe kun la eblecoj de televido, ne estas facile. Estas delikata ekzerco inter sekureco kaj la sugesto de bestoj en normala medio. Samtempe la organizo klopodas altiri la atenton de la publiko. Dum la kvindekaj jaroj de antaŭa jarcento staris en la malgranda sed bela bestĝardeno de Antverpeno, post la kaĝoj de gorilo kaj ĉimpanzo, granda spegulo. Kiel infanon, tio ege impresis min. Poste mi klopodis viziti bestĝardenojn en ĉiu urbo kie mi estis.

Nun mi povas diri, ke unu el la plej belaj estas la zoologia ĝardeno de Sandiego. Ĝi etendiĝas 250 hektarojn kaj montras pli ol 800 diversajn bestojn. Ne nur la bestoj sed ankaŭ la plantoj estas abundaj kaj bele montritaj. La prizorgado de la tuto atestas multjaran profesion konon. La imito de tropika pluvarbaro kun artefarita pluvo estas impona.

Ni devis enviciĝi por viziti la pandojn. Komence ni vidis

sur ŝildo averton, ke oni ne faru tro da bruoj: pandoj ne ŝatus bruon. Sed poste staris virino kun mikrofono kiu sufiĉe laŭte kaj daŭre eksplikis ke la virbesto dormis kaj la bestino havas tiom da jaroj, ke ŝi pezus tiom da kilogramoj... ktp.

La du bestoj estis en apartaj kaĝoj kaj iomete malpuraj. Tamen la ronda kapo kun la ŝajnaj grandaj okuloj moligis ĉiun homon. Mi legis, ke oni havas problemojn por bredi pandojn. Pro tia vico kaj la daŭra eksplikado de la virino mi havas komprenon pri la problemoj de la bestoj ĉi tie. Poste ni vidis kamelojn kaj dromedarojn. Finfine ni vizitis du elefantojn. La zoologia ĝardeno de Sandiego faras multajn sciencajn laborojn pri la hormonstato en elefantoj, ankaŭ grava afero en la bredda programo.

La vizito certe valoris. Mi estas ege danke al Reni, Vernero kaj Spomenka pro tio, ke mi havis la eblecon kuniri.



Wikipedia

La NASKan Faskon redaktas via afabla helpinstruisto Hoss, sed **li nepre bezonas vian helpon!** Ne timu, se vi ne sentas vin komforta pri verkado; Hoss helpos vin korekti kaj poluri. Ĝuste nun li *senpacience* kaj *avide* atendas viajn kontribuojn—ĉu fotojn, desegnaĵojn, artikolojn, poemojn, amo-leterojn... kion ajn. Sendu viajn materialojn perrete al [<nask.esperanto@gmail.com>](mailto:nask.esperanto@gmail.com) aŭ portu ilin piede al Asante#127.